# La Bulteneto

Numero 41 ❁ Jaro 2019

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO




# Malgranda „spitŝtato“ sur la teritorio de Okcidenta Aŭstralio

# La Bulteneto

Numero 41 • Jaro 2019
Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

La paperan version ricevas donace
Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio;
aliaj bibliotekoj post peto.

Podofo senpaga.

Tekstoj kaj fotoj: Josef Kříž, Ĉeĥa Respubliko

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono

## 2020 estas Julia Isbrücker-Jaro


https://eo.wikipedia.org/wiki/Julia_C._Isbr%C3%BCcker

# Malgranda „spitŝtato“
# sur la teritorio de Okcidenta Aŭstralio

*Helpe de publike alireblaj informoj, precipe en vikipedio,*
*kaj propra arĥivo kompilis*
*Josef Kříž, Ĉeĥa Respubliko, panglotia@gmail.com.*
*Pliaj detaloj rete: Hutt River Principality*

Okcidentaŭstralia farmisto **Leonard George Casley**, posedanto de tieaj terenoj, kies areo estas 7486 hektaroj, neobeis en 1970 ordonon de la aŭstralia registaro malgrandigi la areon por kulturi tritikon sur la teritorio de Hutt River, norde de la urbo Geraldton. Li konsideris tiun ĉi ordonon reprezalia dispono, kiu likvidos lian agrikulturan entreprenadon. Tial li kontraŭstare deklaris la 21an de aprilo 1970 la sendependecon de siaj terspacoj je Aŭstralio. Li argumentis, ke la administrado ne plenumis siajn promesojn kaj ankaŭ ke iamaj malkovrintoj de Okcidenta Aŭstralio neniam deklaris tiun ĉi teritorion havaĵo de „brita krono“.

La aŭstralia registaro neniel reagis je establo de la nova ŝtato, kaj post du jaroj Casley oficialigis ĝian memstarecon, konsiderinte ĝin el sia vidpunkto valida. Casley samtempe prezentis sin mem kiel „princo“ kaj deklaris sian latifundion (farmbienon) **principality** (princolando)**.** La oficiala titolo de tiu ĉi malgranda ŝtato unue estis Hutt River Province Principality (Provinca Princolando de Hutt Rivero) kaj en la jaro 2006 oni ŝanĝis la titolon al **Principality of Hutt River** (Princolando de Hutt Rivero).




*Geografia situacio de Hutt River Princolando*
*en Okcidenta Aŭstralio*



*Princo Leonard G. Casley, la fondinto de Princolando de Hutt Rivero kun sia edzino, la princino Shirley*

Ĉefurbo: **Nain**
Areo: preskaŭ **75 km²**
Establo: la **21an de aprilo 1972**
Nacia himno: **It's a Hard Land** (esperante: Ĝi estas la malmola, kruda lando)
La oficialaj lingvoj laŭ la konstitucio estas **la angla, la franca kaj Esperanto** (Article 8: English is the official language of the Principality of Hutt River with French and Esperanto as second and third languages).
Ŝtata regnosistemo: **Princolando, monarĥio.**

Princolando de Hutt Rivero estas oficiale internacie neaprobita privata ŝtato, kiu troviĝas 20 km de la bordo de hindia oceano kaj 500 km norde de la urbo Perth (Perto) en la okcidenta parto de aŭstralia kontinento.

La princo Casley tamen tre rapide starigis kontaktojn kun multe da ŝtatestroj, inkluzive de la papo mem. La „spitŝtato“ havas sian propran monsistemon kaj diplomatajn pasportojn. Sur ĝia teritorio vivas daŭre eĉ ne 100 civitanoj kaj dum la jaroj ĝi fariĝis alloga turisma atrakcio. Sur la teritorio de la eksa farmbieno estis konstruitaj loĝejoj por turistoj, hoteloj, vendejoj, poŝtoficejo, administra regnodomo kaj ankaŭ flughaveno, kie surteriĝas dufoje en la semajno aviadilo el Perth. Al la civitanoj de Princolando de Hutt Rivero apartenas ankaŭ 13 mil da fremdlandaj simpatiuloj, kiuj posedas pasportojn de la Princolando.

<u>**Princa familio**</u>

Dumviva kapo de la ŝtato estis la princo Leonardo la 1a (propra nomo: Leonard Casley, naskiĝis en 1925). La princino estis lia edzino Shirley, la kronprinco estas la plej aĝa de iliaj sep infanoj Ian Casley (*1947). Regento estas Kevin Gate de Queensland, plej aktiva propagandisto de la Princolando. La 11an de februaro 2017 la princo Leonardo abdikis je sia posteno pro tro alta aĝo (tiam 92 jaroj) kaj pro malboniĝanta sanstato. Sur la trono sidiĝis la saman tagon lia plej juna filo Graeme, do ne la kronprinco Ian, longtempe preparata por tiu ĉi posteno. Kialon mi ne scias, eble pro internaj kaŭzoj de la princa familio.

De la jaro 1973 la malgranda ŝtateto eldonadas poŝtmarkojn (kutime du seriojn en la jaro), ilies temoj estas flaŭro kaj faŭno de la propra teritorio, heraldiko, bibliaj temoj kaj pluaj regionaj interesaĵoj, vidindaĵoj. Universala Poŝta Unio ne aprobis la poŝtmarkojn. Princolando de Hutt River havas eĉ sian propran monsistemon, kies monunuo estas **Hutt River-dolaro** (1 dolaro = 100 centoj). La mono validas nur sur la teritorio de la ŝtateto. Ĉiu vizitanto povas ilin akiri kontraŭ la oficiala aŭstralia mono (1:1). Bankbiletoj, unuafoje eldonitaj en 1975, ne portas precizan eldon-daton, sed nur la jaron 1970 prezentita en ŝtata blazono sur la bankbiletoj. Ili eldoniĝis en jenaj valoroj: 10 centoj (blukolora), 20 centoj (verdkolora), 50 centoj (ruĝkolora), 1 dolaro (violkolora), 2 dolaroj (oranĝkolora):



Ĉiuj bankbiletoj havas la saman formaton 140 x 72 mm. Sur la averso (frontflanke) estas portreto de la princo Leonardo mem, lia subskribo kaj oficiala ŝtata blazono. Sur la reverso (dorsflanke) estas simboloj de farmista vivo, lokaj naturaj vidindaĵoj kaj malnovtempa kulturo de tiu ĉi okcidenta parto de la aŭstralia teritorio.

En 1976 estis unuafoje eldonitaj ankaŭ metalaj moneroj … jen, iliaj valoroj:

| **Valoro** | **Metalo** | **Diametro (mm)** |
|---|---|---|
| 5 centoj | aluminio (Al) | 16,5 |
| 10 centoj | kupro (Cu) | 19,1 |
| 20 centoj | latuno (Cu+Zn) [1)] | 22,4 |
| 50 centoj | tombako (Cu+Zn) [2)] | 24,9 |
| 30 dolaroj | arĝento (999/1000 da Ag) | 38,1 |
| 100 dolaroj | oro (24 karatoj da Au) | 25,0 |

[1)] **latuno** enhavas 4 - 80 % da kupro, [2)] **tombako** enhavas 84 - 90 % da kupro

La samaj moneroj estis denove stampitaj en 1978 kun la jarindiko 1979. Jen ekzemple kiel aspektas la monero de 30 dolaroj:




La moneroj de ĉiuj nominaloj estas samtemaj. Sur la averso estas la kapo de la princo de la maldekstra flanko, ambaŭflanke de la kapo estas po unu tritika spiko, supre majuskla priskribo PRINCE LEONARD, sube la jaro de ilia eldono (1976, resp. 1978). Sur la arĝenta kaj la ora moneroj estas aldonita indiko de la metalo. Sur la reverso estas ŝtata blazono kaj supre en majuskla skribo ● HUTT ● RIVER ● PROVINCE ● kaj sube estas pervorta indiko de la

valoro de la monero. La monerojn stampis la firmao Philips Mint en la urbo Serman Oaks (Kalifornio, Usono) kaj la monerfarejo Lombardo en Kanado. Numismatika bulteno eldonita en Hutt River Princolando anoncas, ke la vendon de la moneroj por kolektantoj aranĝas firmao Treasury Department, Hutt River Province, Via Como 6152, Western Australia.

Okaze de la „arĝenta jubileo“, tio estas de la 25jara reĝado de la brita reĝino Elizabeta la IIa (1977), estis eldonita jubilea dolara monero, kiu fariĝis en la sama jaro la motivo por eldono de tri poŝtmarkoj. Sur la poŝtmarko de la valoro 18 centoj estas bildigita la averso de la menciita monero, sur la poŝtmarko de 25 centoj estas bildigita la reverso de la menciita monero kaj sur la poŝtmarko de 45 centoj estas bildigitaj ambaŭ flankoj de la menciita jubilea monero. Proksimuman bildon de la jubilea monero mi konas almenaŭ dank´ al tiu ĉi laste priskribita poŝtmarko:




**<u>Kaj konklude …</u>**

La 16an de junio 2017 Leonard George Casley – do, en tiu tempo ne plu oficiala regnestro de la Princolando – estis akuzita de la okcident-aŭstralia juĝa tribunalo pro fraŭdado de impostoj de sia entreprenado. Pro tio li ricevis financpunon je 2,7 milionoj da aŭstraliaj dolaroj. La princo malakceptis la verdikton kaj celis nuligi ĝin. Tial longtempe li disputis helpe de siaj juristoj kun la aŭstralia imposta ofico. Sed la situacio fariĝis komplika, kiam princo Leonard Casley (93jara) la 13an de februaro 2019 mortis pro pulmoinfekto.

**Sekvantaj aliaj „spitŝtatoj”**

Hutt River Princolando, kvankam ĝi ne estis internacie aprobita, servis en la 70aj jaroj de la pasinta jarcento kiel modelo por kelkaj pluaj „mikroŝtatetoj“ en tuta Aŭstralio - kiel ekzemple Bumbunga, Rainbow, Creek kaj Avram. Kialo estis unue tradicia individualismo de aŭstralianoj, sed ankaŭ ilia historie malforta rilato al la brita registaro. La plej longan ekziston el ĉi tiuj memproklamitaj ŝtatetoj havas Hutt River Princolando.

**Hutt River Princolando kaj ĉeĥoj**

Interese estas, ke diplomata pasporto de Hutt River Princolando helpis en 1984 al ĉeĥa civitano elmigri el sia lando Okcidenton. En la jaro 2000 estis en praga flughaveno katenita kaj sekve arestita alia ĉeĥa aventurulo, post kiam li prezentis sin al policanoj pere de personaj dokumentoj de Hutt River Princolando.

**Ŝtataj simboloj:**



Ŝtata flago




Ŝtata blazono (sigelo)



Krono de la princo